***********************************************************************************

**INSTRU-CIRKULERO 2013/03 (decembro 2013)**

Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj

***********************************************************************************

Karaj Gekolegoj,

Jen mi lasta ĉi-jara cirkulero kun novaĵoj, gravaj informoj:

La kutima **jarĉefkunveno de AGEI** okazis dum GEK en Nürnberg. La resuman jarraporton pri la agado en 2012 mi sendis al ILEI. Ĝi estas trovebla sur nia hejmpaĝo kune kun la financa raporto en .pdf formato ĉe http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=97868652
Por neuzantoj de interreto laŭ peto mi volonte sendas ilin per poŝto.

Nia **jarĉefkunveno en 2014** okazos dum la 91 GEK en Erfurt en sabato, 07.06.2014 ekde 15:45 http://www.esperanto.de/gea.malnova/gek2014.html. La plej favorkotiza aliĝperiodo finiĝos la 31an de decembro 2013.

## I. Sukcesa jaro 2013

1. En tiu jaro estis granda defio por ni la organizado de la **46a ILEI-konferenco** en Sieber/Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo. Ni ĝojas, ke finfine ankaŭ Germanio povis fariĝi konferenca gastiganto kaj la evento allogis 88 partoprenintojn el 22 landoj, el ĉiuj kontinentoj (Aŭstralio, Belgio, Ĉinio, Francio, Finnlando, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Japanio, Suda Koreio, Kroatio, Kubo, Makedonio, Nederlando, Nepalo, Pollando, Rumanio, Slovakio, Svedio, Svislando, Usono).

La specialaĵo de la ĉi-jara konferenco estis la grandnombra partopreno de junaj lernantoj el Herzberg kaj ĝia ĝemelurbo Góra. La 8a Somera Arbara Lernejo (SALO) okazis paralele kun la instuista konferenco ebligante observadon de la pedagogia laboro, komunajn kulturajn programerojn kaj reciprokan konatiĝon, amikiĝon. Tio bone kongruis kun la ĉeftemo de la konferenco: Instruado de Esperanto al ĉiuj generacioj. Alia grava parto estis la metodika seminario gvidata de Katalin Kovats, kiu zorgis pri la faka trejnado de la jamaj kaj estontaj gekolegoj. Dum la konferenco eblis trapasi ankaŭ UEA KER-ekzamenojn en niveloj B2 kaj C1.

Pri la konferenco aperis pluraj gazetartikoloj en la loka kaj regiona gazetaro kaj postrestos nova ZEO: la ponto en vilaĝo Sieber ricevis la nomon La Ponto de Espero kaj restos daŭra memorigilo pri la 46a ILEI-konferenco kaj SALO 8 en la 20a jubilea jaro de ĝemelurbaj kontaktoj inter Herzberg kaj Góra.

Okazis ŝanĝoj en la estraro de ILEI. Jen la novaj funkciuloj:

**Nova estraro de ILEI por 2013-2015**

**Prezidanto: Mireille GROSJEAN „Mirejo", Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <*mirejo.mireille@gmail.com*>. Tel. fiksa (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 7969** 709 66. Kunordigado de la estrara laboro. Informado al la movado (*www.ilei.info*) kaj al la ekstera mondo. Rilatoj kun UNESCO kaj FIPLV. Reprezentanto de ILEI ĉe la estraro de UEA.

**Vicprez.**: Zsófia KÓRÓDY, Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio. <*zsofia.korody@esperanto.de*>. Tel./fakso fiksaj: (+49) 5521-5983. E-centroj, ekzamenoj, ALTE.

**Vicprez.**: GONG Xiaofeng „Arko", School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, CN-330031 Nanchang, Ĉinio. <*arko.gong@qq.com*>. Universitatoj.

**Sekretario**: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. <*ilei.sekretario@gmail.com*> por sekretariaj aferoj, <*radojica.petrovic.rs@gmail.com*> alie. Tel. fiksa (+381) 32 371053. Konferencoj, rilatoj kun TEJO.

**Vicsekr.**: Magdaléna FEIFIČOVÁ „Fejfi", Bernolákova 25/5, SK-010 01 Žilina, Slovakio. <*ilei.oficejo@gmail.com*> . Membro-administrado. Rilatoj kun FEL.

**Estrarano pri financoj**: William HARRIS „Vilĉjo”, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <*ilei.kasisto@gmail.com*>. Tel. fiksa (+ 510) 653 0998.

**Estrarano:** Bharat GHIMIRE, G.P.O. Box 10518, Kathmandu, Nepalo. Tel. (+1) 620 9877. <*nespa.1990@gmail.com*>. Universitatoj. Komisiito por helpi al aliĝpetoj.

**Estrarano**: Enikő ZENGŐ SEREGHY, Dózsa u.14. 2/8, HU-4400 Nyíregyháza, Hungario. <*enimyster@gmail.com*>. Tel. portebla: (+ 36) 203234365.
Kalendaro, ekzamenoj, multlingva paĝaro *www.ilei-mondo.info*, varbado.

**Estrarano**: Penny VOS, Aŭstralio <*penivos@yahoo.com*>. Lerneja agado.

2. En 2013 ni festis la **Mondan Tagon de Instruistoj**, kiu estas proklamita de Unesko kaj okazas la 5an de oktobro. Ni esperantistoj malkovris kaj eluzis ĝin ekde la pasinta jaro. La aperigo de tiutagaj Esperanto-eventoj sur la koncerna hejmpaĝo kaj gazetaraj komunikoj pri kunvenoj kaj festado en diversaj landoj estas bona varbado por nia lingvo.
http://www.unesco.org/new/en/unesco/events/prizes-and-celebrations/celebrations/international-days/world-teachersday/

**3. Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg**, la klerigejo de GEA okazigis denove sukcesajn studsesiojn, klerigmodulojn, kiuj bone servis la studemulojn kaj aktivigis plurajn interesiĝantojn ne nur al pasiva aŭskultado sed aktiva kontribuo al la faka programo. Tiuj semajnfinaj sesioj estas taŭgaj kaj instigaj kunvenoj por lingva perfektiĝo, altnivela studado kaj metieja spertinterŝanĝoj.

- 58a Studsesio: internaciaj kaj naciaj projektoj, tradukado de faktekstoj, praktika realigado de la grandprojekto "Nacia Parko Harz kaj Esperanto"
- 59a Studsesio: klerigkurso kun fakprelegoj de Yashovardan, Zsófia Kóródy, Martin Ptasinski, Ewa Kukielka kaj Peter Zilvar
- 60a Studsesio: terminologio kaj tradukado. Daŭrigo de la projekto Nacia Parko Harz
Grave kaj ĝojige: rezulto de tio estas jam videbla sur la hejmpaĝo de la Nacia Parko Harz, kie aperis la unua tradukita broŝuro en Esperanto http://www.nationalpark-harz.de/de/downloads/esperanto/
- 61a Studsesio: literaturo, movadhistorio, memorprelegoj pri Joachim Gießner, kiu naskiĝis en 25.12.1913, do antaŭ 100 jaroj.
- 62a Studsesio: ĉeftemo: sano, alternativa vivmaniero, kulturo, muziko, filmoj.

## II. Studebloj, ekzamenoj en 2014

1. la **GEA-klerigejo en Herzberg am Harz** ofertas 5 studsesiojn kun diversaj temoj laŭ la modelo de internaciaj universitataj studoj. programojn vidu ĉe http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=91295910

- februaro 14-16: 63a Studsesio
- majo 30-junio 01: 64a Studsesio
- septembro 12-14: 65a Studsesio
- oktobro 03-05: 66a Studsesio TORPEDo 9 (Tradiciaj Oktobraj Pedagogiaj Tagoj)
- decembro 12-14: 67a Studsesio

**2. julio 19-aŭgusto 03 2014**: Intensa dusemajna klerigado, perfektiga studado.
**SEMAJNOJ DE ESPERANTO-PERFEKTIĜO (SEP).** Ĝi sekvos la jam sukcese organizitan similan trejnadon dum somero 2012. La strukturo de tiu lastjara modula kursaro estas videbla ĉe http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=80022548

Kion ni ofertos en 2014? Lingvan perfektigon kun multe da konversacieblo, fakprelegojn pri lingvistiko, gramatiko, interlingvistiko, Esperanto-literaturo, kulturo, movadhistorio kaj metodiko. Aldoniĝos praktikaj taskoj, ekzercado, informado pri lingvo-ekzamenoj, ktp.
La bibliotekto de Interkultura Centro Herzberg donos abundan materialon, bonan helpon por surloka studado, esplorado, verkado de diplomlaboraĵo.

**3. UEA KER-ekzamenoj** en B2 kaj C1 niveloj estas anoncitaj dum GEK http://www.esperanto.de/gea.malnova/gek2014.html en Erfurt. Bonvolu aliĝi ĝustatempe kaj eluzi la bonŝancon akiri valoran internacie rekonatan atestilon pri viaj lingvaj kapabloj. http://edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj

**III. Kursoj, instrujaro 2013/2014**

**1. Baz- kaj mezlernejoj:** bedaŭrinde ne venis raportoj pri lernejaj Esperanto-kursoj. Laŭ ricevitaj informoj estis instruado en Erfurt kaj en Dresden. Daŭras sukcesa instruado en baza lernejo en Herzberg kaj en mezlernejoj okazas kursoj en Gymnasium Köln-Pesch (instruas Harald Schmitz) kaj dank' al Comenius-projektoj en Herzberg (Zsófia Kóródy) kaj en Winterberg (Christof Krick).

**2. Universitatoj:** tiuj kursoj aperas ankaŭ en la listo de Germain Pirlot, kiu regule kolektas informojn pri universitataj Esperanto-kursoj el la tuta mondo:
- libervola lingvokurso kadre de "Ĝeneralaj Studoj" en Münster (instruas Norma Seithel kaj Rudolf Fischer) uzante la lernmaterialon de s-ro Fischer www.esperanto.de/lehrbuch „Esperanto en dialogo"
- en Stuttgart gvidata de Johannes Mueller
- en Emden, sub gvido de Sebastian Kirf 28 studentoj, grupo de kiuj partoprenis kun li intensan kurson en Herzberg

Ni ne povas troigi la gravecon, ke ni registru kursojn de Esperanto. La oficiala registrejo de kursoj por UEA kaj ILEI estas ĉe http://edukado.net/kursejo pere de elektronika formularo.
La listigo estas teknologie moderna. Bonvolu zorgi, ke ankaŭ via kurso aperu sur la mapo kaj ke viaj lernantoj kaj instruistoj havu fenestron al la mondo! Tie vi povas vidi laŭlandajn listojn kaj mapon, eĉ povas starigi interklasajn kontaktojn.

**3. Popolaltlernejoj (VHS)**: el pluraj urboj venis informoj pri planataj popolaltlernejaj Esperanto-kurso. Estas ĝojige, ke gekolegoj kuraĝe anoncas tiujn kursojn eluzante la vastan informeblon per la programkajeroj kaj interretaj aperoj. La alvokojn ni kolektas ankaŭ modelcele por estonta uzo ĉe http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=97868652

**IV. Eŭropaj projektoj**

1. Por Esperanto-instruado kaj aliaj agadoj ofte mankas financoj, pro tio gravas akiri subvenciojn. Unu el la ebloj estas ellabori internaciajn projektojn ekz. enkadre de la Dumviva Lernado Programo de la Konsilio de Eŭropo. Por internacia kontaktado kaj akiro de informoj indas rigardi la paĝaron http://www.etwinning.de
Por lernejoj ĝis somero 2014 daŭras ankoraŭ du sukcesaj Comenius-projektoj kun germanaj partnerlernejoj. En unu kunlaboras Gimnazio Winterberg, en alia E-M-A Gimnazio en Herzberg am Harz (http://comenius.esperanto-urbo.de/).
Krom regula Esperanto-instruado (AG) la lernantoj povas spertiĝi ankaŭ en aliaj landoj vizitante siajn partnerlernejojn kaj kontaktante samaĝulojn persone aŭ per modernaj komunikadebloj (Skype, Facebook, ktp.).

2. Grundtvig-projektoj celas edukadon de plenkreskuloj. GEA sukcese partoprenis en internacia projekto pri interkultura edukado; Germana Esperanto-Centro en Herzberg sukcesis en nova dujara (2013-2015) projekto pri kultura diverseco kun partneroj el Hungario, Nederlando kaj Pollando.

Ekde 2014 komenciĝos nova periodo, nova strukturo sub la nomo Erasmus+ (plus). Se vi interesiĝas pri simalaj projektoj, bv. kontakti nin, Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy, kaj ni volonte helpos. La ŝanĝoj enhavos pozitivaĵojn kaj pli facilan projekteblon krom lernejoj ankaŭ kun aliaj institucioj.

Limdato por novaj projektoj estos en marto 2014, do restas ankoraŭ iom da tempo por ellabori detalojn kaj kunordigi agadplanon kun eksterlandaj partneroj.

## V. Alvokoj, informoj:

### 1. Konkurso de infan-desegnaĵoj

Ni invitas ĉiujn instruistojn, ĉiujn gepatrojn, kiuj deziras partoprenigi siajn gelernantojn aŭ infanojn al tiu konkurso. Reguloj:
Jara temo: Marŝado kontraŭ malegalecoj kaj rasismo
Formato: minimume 30 x30 cm
Limdato: 1a de marto 2014
Dorse de la desegnaĵo notu esperantlingve la nomon, aĝon de la infano, adreson de la lernejo aŭ de la E-klubo, kaj sur la desegnaĵo skribu mesaĝon pri la temo por la tuta mondo!
La desegnaĵoj ebligos ekspoziciojn en diversaj lokoj de nia urbo. Ni sendos fotojn al vi pri tiuj ekspozicioj. Ni antaŭdankas ĉiujn partoprenantojn. Bonvolu sendi desegnaĵojn al:
Centre Culturel St Nazaire Esperanto, 38, rue de la Croix Fraîche, 44600 Saint Nazaire, France

### 2. Nova faklibro

Antaŭ nelonge s-ino Angela Tellier redaktis kaj aperigis anglalingvan libron pri la ĝisnunaj rezultoj de la Springboard-programo, sub titolo "Esperanto as a starter language for child second-language learners in the primary school". La libro estas havebla de EAB:
http://esperanto.org.uk/eab/bookshop/espasastalan.htm aŭ de la UEA libroservo
http://katalogo.uea.org/index.php?inf=9012 76 paĝoj, 12,60 EUR

### 3. Pedagogia-metodika fakkolektaĵo

La biblioteko de Interkultura Centro Herzberg (37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6, http://ic-herzberg.de) kore dankas al s-ino Karin Ruff-Sonnabend, Philippe Benoit, Betty Chatterjee kaj ĉiuj, kiuj donacis librojn, lernolibrojn, vortarojn kaj faklibrojn, literaturajn verkojn, gazetojn, ktp. al la biblioteko kaj per transdono de tiuj materialoj aŭ per prizorgado de heredaĵoj riĉigis la kolektaĵon. Ĉio estas ordigita, katalogita, trovas sian bonan lokon en la biblioteko kaj servas lernemulojn, studemulojn, partoprenantojn de lingvokursoj, trejnsesioj, seminarioj.
Bv. kontakti min aŭ Peter Zilvar rilate al novaj donacoj ankaŭ per interreto esperanto-zentrum@web.de

### 4. Juna Amiko

Abonu la revuon, kiu helpas ne nur al komencintoj kaj lernantoj sed same taŭgas ankaŭ por instruantoj de la internacia lingvo. Ĝi provizas variajn, mallongajn legaĵojn en simpla, aŭ almenaŭ ne tro komplika lingvaĵo. Sen vort-klarigoj la revuo uzas nur 1500 vortojn, la plej oftajn, kompreneble. Ni dankas kaj gratulas al Stefan MacGill, kiu ĝis nun bone redaktis la ŝatatan revuon kaj kore ni salutas la novan redaktoron, Stano Marcek, kiu jam ekagis kaj redaktos la mankantajn numerojn de 2013 kaj kun nova elano plenumos la redaktadon ekde 2014.
Estas planataj kelkaj modifoj kaj kun la redaktoro ILEI serĉos solvon por pli malmultekosta presado kaj liverado, do atendeblas pozitivaj ŝanĝoj sed la abonkotizo restos €16 en tiel-nomataj A-landoj kaj €11 en B-landoj. (po €13 kaj €9 respektive, por mendo de tri aŭ pli da ekzempleroj al la sama adreso).
Sponsoru tiujn, kiuj mem ne povas aboni ĝin kaj varbu ankaŭ novajn abonantojn, ke la revueto povu daŭre aperadi!

Sendu viajn abondezirojn al mi: Zsofia Korody, 37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6, zsofia.korody@esperanto.de

## VI. Membraro

En 2013 nia membronombro iom malaltiĝis pro la bedaŭrinda forpaso de pluraj longjaraj fidelaj membroj. Ni adiaŭas inter aliaj de Hermann Behrmann, Rüdiger Sachs kaj Helmar Frank, kiuj ĉiuj multe laboris, multon faris por la disvastigo de Esperanto per sia aktiveco, multflanka instru- kaj fakagado, scienca verkado.

Nekrologojn vi trovas ĉe edukado.net, kie vi povas lasi ankaŭ kondolencajn mesaĝojn.
Pri Frank: http://edukado.net/biblioteko/panteono?iid=55&s=126e4de4fb68d8ff39f3cb57f02f5890
Pri Behrmann:
http://edukado.net/biblioteko/panteono?iid=122&s=184f75c4ceed0d235523be8bd9c14514

**Membro-varbado**
Ni kore dankas al ĉiuj niaj membroj la **subtenon al AGEI** kaj esperas je remembriĝo en 2014.
La membrokotizo ne ŝanĝiĝos.
Ni alvokas vin rekomendi la servojn de AGEI al ĉiuj, kiuj interesiĝas pri Esperanto-instruado kaj mem agas por la disvastigo de la internacia lingvo. Ĉirkaŭrigardu en via regiono, inter via amikaro, kolegaro kaj informu ilin pri la avantaĝoj de membriĝo. La membriĝo estas ebla por ĉiuj, ne nur al instruisto. Bonvolu laŭbezone kopii la aliĝilon kaj transdoni ĝin al aliĝontoj. Vi trovas rete deŝuteblan pdf-aliĝilon ĉe http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=78065795


Jen bazaj informoj:
AGEI estas la germana landa sekcio de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, tiel la membroj de AGEI estas samtempe membroj de ILEI.
La membroj de AGEI ricevas:

- fakan subtenon, konsiladon, eblon je spert- kaj informinterŝanĝo kun gekolegoj, fakuloj
- ofertojn por klerigado, pluklerigado
- la gazeton Internacia Pedagogia Revuo (IPR, aperas 4-foje jare en Esperanto) kaj
- retan/poŝtan cirkuleron kun informoj


La membreco kostas EUR 25,- jare. Familianoj ricevas rabaton.
La kotizon (kiu enhavas la abonon de IPR) bonvolu sendi al la konto de AGEI:
Numero 5187110500 Volksbank Schmallenberg BLZ 46062817

Mi deziras la ĉiuj AGEI-membroj, familianoj, geamikoj, gekolegoj agrablan Kristnaskon, belegajn festotagojn kaj sukcesan, feliĉan novan jaron!

Kun multaj salutoj,



Zsófia Kóródy
prezidanto de AGEI



## Verband Deutscher Esperanto-Lehrer e.V.
## Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj

# Beitrittserklärung

Hiermit erkläre ich meinen Beitritt zum Verband Deutscher Esperanto-Lehrer e.V. (VDEL) und zu dessen internationalem Dachverband, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), im laufenden Kalenderjahr.

………………………………………………………………… ………………………………..
(Name, Vorname, Titel) (Geburtsdatum)

…………………………………………………………………………………………………..
(Adresse: PLZ, Wohnort, Straße und Hausnummer)

……………………..… …………………………… ………………………………………..
(Telefon) (Fax) (E-Adresse)

❒ Ich war schon Mitglied in ILEI und habe meinen diesjährigen Jahresbeitrag schon bezahlt.

❒ Ich möchte die Internacia Pedagogia Revuo nur in elektronischer Form enthalten.

❒ Ich unterrichte in (Schulform/Hochschule): ……………………………………………………

❒ Meine Fächer sind: ………………………………………………………………………………

❒ Ich habe schon Esperanto unterrichtet. ❒ Nein, aber das interessiert mich wohl.

❒ Ich würde auch Kurse außerhalb meiner Arbeitsstelle geben (VHS, o.ä.)

❒ Ich habe ein Esperanto-Examen (GEI, ILEI) ❒ Nein, aber das interessiert mich wohl.

……………………..…., den ………………….. ……………………………………………
(Ort) (Beitrittsdatum) (Unterschrift)

# Einzugsermächtigung

Hiermit ermächtige ich den zuständigen Schatzmeister, den laufenden Jahresbeitrag für VDEL/ILEI von meinem folgenden Girokonto einzuziehen:

…………………………… ……………………………………………… …………………………..
(Kontonummer) (Bank) (Bankleitzahl)

Kontoinhaber, falls nicht mit dem Mitglied identisch: ………………………………………………

…………………
(Datum)

………………………………………
(Unterschrift des Kontoinhabers)

Falls kein Einzug gewünscht, den Jahresbeitrag bitte an das u.a. Konto überweisen.

Mitgliederverwaltung und Schatzmeister:
Christof Krick, Günninghauser Str. 11a, 59955 Winterberg, Tel. 02981/899557,
christof.krick@esperanto.de

*Bankverbindung des VDEL: Konto 5187110500 Volksbank Schmallenberg BLZ 46062817*